# Vertikale

Dumonata
periodaĵo
por la aktivuloj
de FEL

Kromnumero 1
Marto 1996

*speciala numero kun*

*la Regularoj pri*

*- la Lokaj Grupoj*

*- la Administrantaro*

*- la Estraro*

*- la Estrarelektoj*

*- la Komisionoj*

## *ENHAVE*

Regularoj pri
la Lokaj Grupoj .................... 3
la Administrantaro ................ 7
la Estraro ............................ 11
la Estrarelektoj .................... 15
la Komisionoj ....................... 21

**Flandra Esperanto-Ligo**

**Estraro:**
Prezidanto: *Ivo Durwael*
Vicprezidanto: *Wim De Smet*
Sekretario: *Johan Van Eenoo*
Vicsekretario: *Marc Cuffez*
Kasisto: *Flory Witdoeckt*
Anoj: *Henny De Keteiaere*
*Jef Geraerts*
*Walter Vandekieboom*

**La oficejo de FEL** troviĝas en Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Ĝi estas malferma por la publiko ĉiun labortagon inter la 9a kaj 12a30 kaj inter la 13a30 kaj 17a30. Vizitantoj bonvolu tamen anticipe interkonsenti pri rendevuo.
Telefono (ofichoroj): (03) 234.34.00
Telekopiilo (tagnokte): (03) 233.54.33

Kontribuantoj: Cor Willems, Wim De Smet, Paul Peeraerts, Ivo Durwael, Roland Rotsaert, Johan Van Eenoo, Marc Cuffez.

La ĝenerala respondeco de la revuo restas ĉe la redaktoro, la verkistoj mem respondecas pri siaj propraj artikoloj aŭ raportoj, kaj la enhavo de ili ne devas kongrui kun la opinio de la redaktoro.

**Vertikale**, dumonata periodaĵo por la aktivuloj de FEL. Abonoj ĉe FEL.
Kromnumero 1, apero: 23an marto 1996
Korespondadreso: Vertikale
Cor Willems
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
Tel.: (03) 234.34.00 (oficfhore)

## *ENKONDUKE*

**Kara leganto-aktivulo,**

Jen la unua kromnumero de *Vertikale*. Ĝi estas kromnumero, ĉar ĝi enhavas nur unu rubrikon: la regularojn de FEL, kaj ne la kutimajn raportojn kaj leterojn. Eble sekvos aliaj pri specifaj temoj; vi, kiel leganto kaj informbezonanto - kaj ankaŭ informdonanto - povas kundecidi pri tio.

Sed nun: se vi estas unu el tiuj aktivuloj, kiu legante en la antaŭaj numeroj de *Vertikale* demandis sin, pri kio temas tiuj amendoj kaj aproboj de regularoj, mi havas du aferojn direndaj al vi:
1. *Kial vi ne demandis tion pli frue?* kaj
2. *Jen la respondo en viaj manoj!*

Eĉ se vi jes scias pri kio temas, vi nun posedas en unu kompakta libreto kvazaŭ kompletan listiĝon de tiuj regularoj.
Ĉi tiu kromnumero de *Vertikale*, kiu estas disdonita dum la Ĝenerala Membrokunsido de la 23a de marto 1996, enhavas do ĉiujn kvin pritraktitajn kaj aprobitajn regularojn de FEL. Ĝi inkluzivas ankaŭ la amendojn de la administrantarkunsidoj de 27.01.1995 kaj 11.03.1995, pli aktuale do apenaŭ eblas.

Kaj mi volas ankoraŭ aldoni, ke nunmomente mi estas preparante la venontan numeron de *Vertikale*, do se vi ankoraŭ havas komunikindajn kaj komunikendajn novaĵojn, ne malrapidu: viaj valoraj kontribuoj restas ĉiam bonvenaj.

Ĝis en la venonta (regula) numero,

Cor Willems.

Mallongigoj uzataj en la tekstoj:

ST. 1: Statuto de FEL, ero 1;
RIO 1: Regularo pri Interna Ordo de FEL, ero 1;
1921: Leĝo de 27.06.1921 pri Asocioj Sen Profita Celo.





# *Regularo pri la Lokaj Grupoj*

## A. ĜENERALAĴOJ

a. Kio?

1. Strukturitaj grupoj de personoj, kiuj favoras la disvastigon de la internacia lingvo Esperanto, rajtas esti lokaj sekcioj de Flandra Esperanto-Ligo, se ili plenumas la specifajn kondiĉojn por aparteni al FEL. La gvidantoj de FEL povas mem formi tiajn lokajn grupojn (ST. 3); sed ankaŭ grupoj, kiuj estiĝis el loka iniciato povas decidi aliĝi al FEL.

b. Kial?

2. La aliĝinta grupo havas per tiu aliĝo diversajn avantaĝojn, kiujn ĝi memstare apenaŭ povus havi: revuo por la membroj, publikigo de siaj programoj, dispono pri utilaj konsiloj kaj kunlaboro, aparteno al la tutregiona, al la tutlanda kaj al la tutmonda Esperanto-aktivularo, partopreno en diversaj aktivecoj, kiuj celas la disvastigon de Esperanto, reprezentiĝo en la FEL-administrantaro k.a. - Aliflanke FEL petas de la membraro de la aliĝinta grupo iun financan kontribuon por la tutregiona funkciado.
Per sia aparteno al FEL la grupo ne perdas sian memstarecon kaj ĝi povas agi kiel ĝi mem deziras tiel longe, ke ĝi ne agas malkonforme al la celoj de FEL kaj malutile al la aktiveco de najbaraj FEL-grupoj.

c. Kiom?

3. Kvankam la nombro de lokaj grupoj de FEL principe estas nelimigita, en iu urbo prefere ekzistu ne pli ol unu FEL-grupo. Se tamen montriĝas akcepteblaj kaŭzoj por ke ekzistu pliaj, speciale se tiuj havus iun specifan celon, la FEL-estraro povas fari decidon tiusence (RIO 2.3).
Loka grupo povas krei apartajn subgrupojn por specifaj celoj, ekzemple subgrupo por personoj de la tria aĝo, kaj kiu povus havi apartajn programerojn, sed tia subgrupo tiam ne havas la statuson de aparta FEL-grupo, eĉ se ĝi havus propran estrareton.

## B. KONDIĈOJ

ĉ. Kiel?

4. Por ke grupo povu aparteni al Flandra Esperanto-Ligo ĝi devas plenumi jenajn kondicojn:
a. konsisti el minimume kvin personoj de aĝo de pli ol 15 jaroj kaj apartenantaj al minimume tri diversaj familioj;
b. esti preta akcepti en sia membraro personojn de kiu ajnaĵo, vivkoncepto, profesio, intereso, lingvo, nacieco k.a., se almenaŭ tiuj personoj per sia konduto ne pruveble malutilas al la famo de la grupo aŭ de FEL;
c. havi estraron de minimume tri personoj;
ĉ. havi klaran nomon, ĉu en la nederlanda, ĉu en Esperanto, ĉu en la du;
d. havi sian adreson ie en la flandra regiono de Belgio;
e. organizi aŭ intenci organizi minimume kvar fojojn en la jaro iun aktivecon, kiu rilatas al la lingvo Esperanto;
f. pagi ĉiujare al FEL la deciditan kontribuon de la membroj;
g. konsenti pri la rolo, kiun FEL deziras de la grupoj (ero 6).

5. Grupo kiu deziras aparteni al FEL devas:
a. fari peton tiusencan, subskribitan de la prezidanto kaj de la sekretario de la grupo kaj direktatan al la sekretario de FEL (RIO 2.1);
b. indiki la kompletajn nomojn kaj adresojn de siaj tiamaj membroj plus ilia naskiĝojaro kaj eble ilia profesio (RIO 2.1);
c. informi koncize pri la jam entreprenitaj agoj favore al la disvastigo de Esperanto;
ĉ. informi pri la strukturo de la grupo; se ekzistas statuto aŭ regularo de la grupo ĝi estu aldonata (RIO 2.1).
La estraro de FEL pristudos la peton, formulos opinion kaj transdonos tiun opinion al la FEL-administrantaro, kiu prenos la decidon. La FEL-sekretario informos la grupon pri la decido.
Se la aliĝpeto estas rifuzita, nova peto povas esti farata nur unu jaron poste.

d. Kiusence?

6. La rolo de la loka grupo rilate al FEL estas:
- transpagi deciditan parton de la membrokotizoj (RIO 2.5);
- raporti regule pri la faritaĵoj (programoj de la kunsidoj; Esperanto-kursoj; festoj; iniciatoj k.a.);
- sugesti iniciatojn, kiuj povus kontribui al la progreso de Esperanto;
- inviti estraranojn de FEL al specialaj aranĝoj;
- partopreni en la decidoj de FEL per la administranto(j), kiu(j)n la grupo rajtas delegi, nome unu delegito por ĉiu komenciĝinta kvindeko da membroj (RIO 3.1.1);
- konigi sian apartenon al FEL en diversaj cirkonstancoj, ekzemple per indiko sur sia leterpapero (RIO 2.4).





## C. APARTAJ ARANĜOJ

7. Pluraj grupoj el iu regiono povas decidi kunligi siajn fortojn kaj formi lokan ligon. Tiu formo de kunlaboro devas esti klare formulita en teksto, kiu devas esti akirinta la aprobon de la FEL-estraro, speciale se ĝi enhavas erojn, kiuj havas influon sur la agado aŭ sur la financoj de FEL.
Tia ligo estas nur libervola intencdecido de kunagado; ĉiu el la aliĝintaj FEL-grupoj havas sian propran estraron kaj sian propran kason, kaj kelkajn proprajn programojn, kaj rajtas havi sian propran delegiton en la administrantaro de FEL. Neniu FEL-grupo el la koncerna regiono povas esti devigata aparteni al tiu ligo, se ĝi ne deziras tion. Ankaŭ devas resti la rajto de ĉiu al ĝi aliĝinta loka grupo eliĝi el tiu ligo se ĝi havas specialajn kaŭzojn por tio.
Tia ligo nur havas ekzistorajton se almenaŭ du grupoj apartenas al ĝi; ĝi aŭtomate malfondiĝas, se restas nur unu grupo. Sekve de tia malfondo ĝia bonhavo aŭ ĝiaj ŝuldoj transiras al la restantaj grupoj.

8. Grupo povas esti eksigata el FEL en unu el jenaj cirkonstancoj:
a. se ĝi ne estas transpaginta la kontribuojn de siaj membroj al FEL kaj estas ricevinta du avertojn tiusence;
b. se ĝi entreprenas agojn, kiuj pruveble malutilas al la famo de FEL;
c. se ĝi daŭre malfavore agas rilate al FEL-grupoj el la sama regiono;
ĉ. se ĝi klare subtenas agojn, kiuj ne konformas kun la en la statuto de FEL formulita principo de neŭtraleco (ST. 3);
d. se ĝia agado sur la kampo de neŭtrala internacia lingvo ne konformas kun tiu de la lingvo kiel ĝi estas iniciatita de doktoro L. Zamenhof, kaj kiel ĝi estas daŭre gvidata de la Akademio de Esperanto;
e. se ĝi neglektas informi la FEL-estraron minimume unufoje en la jaro pri la vivo de la grupo;
f. se ĝia membronombro malkreskas sub kvin.
La FEL-estraro rajtas proponi tian eksigon, sed la FEL-administrantaro decidas pri ĝi. Antaŭ tiu decido la koncerna grupo devas esti havinta la okazon defendi sin kontraŭ la akuzoj, kiuj kaŭzus ĝian eksigon. La eksigo estas definitiva ekde la dato de la administrantara decido.

9. Loka grupo rajtas eksiĝi el FEL je pruvebla decido de sia membrokunsido. La eksiĝo devas esti komunikata al la FEL-prezidanto antaŭ la 1a de oktobro por esti valida je la 1a de januaro de la sekvonta jaro. Se en tiu periodo de tri monatoj la grupo ŝanĝas sian decidon kaj komunikas tion al la FEL-prezidanto, ĝi povas senprobleme resti en FEL.

10. Eksigita aŭ eksiĝinta grupo povas reveni en la sinon de FEL post oficiala peto kaj post akiro de la aprobo de du trionoj de administrantarkunsido. La FEL-estaro rajtas peti dokumentojn aŭ la ĉeeston de reprezentanto(j) de la koncerna grupo por havi pli klaran ideon pri la seriozeco de la peto.

11. Loka FEL-grupo povas malfondiĝi en unu el jenaj cirkonstancoj:
a. se ĝi preferas kunfandiĝi kun alia FEL-grupo, kiu estas preta akcepti ĝiajn membrojn, kasstaton kaj arĥivon;

b. se ĝia membraro mem dum kunsido decidas pri malfondo;
c. se ĝia membronombro ne plu atingas kvin;
ĉ. se ĝi ne sukcesas konsistigi estraron de minimume tri personoj;
d. se ĝi ne plu sukcesas organizi ion konvenan;
e. se eksteraj cirkonstancoj estas kaŭzintaj tion.
En kazo de vera malfondo (do sen kunfandiĝo) la kasenhavo estu transdonata al FEL, kiu konservos ĝin dum du jaroj je dispono de ebla novfondota grupo en la sama loko; se nova grupo tie ne aperas la kasenhavo eniras en la kason de FEL (RIO 2.8). - Aliflanke FEL ne respondecas pri eblaj ŝuldoj de la grupo je la momento de la malfondo.
Se FEL-grupo malaperas sen iu informo al la FEL-estraro, la FEL-estraro komisiu iun personon esplori surloke la cirkonstancojn kaj trovi solvon pri la kasenhavo.

12. Principe ĉiu FEL-membro apartenas al iu el la FEL-grupoj, kvankam li/ŝi rajtas rifuzi tion. La membro mem elektu la preferatan grupon kaj konstatu ĉu li/ŝi estas bonvena en ĝi. Se la membro mem ne faras decidon tiusence, la Esperanto-centro de FEL klasifas lin/ŝin en la grupon plej apudan de lia/ŝia loĝloko. - FEL-membro povas cetere membriĝi en pluraj grupoj, sed nur unu inter ili estas lia/ŝia hejmgrupo.

13. Ekzistantaj organizaĵoj, kiuj havas rilatojn kun iu ajn formo de la Esperanto-movado kaj kiuj havas en la flandra regiono iun organizitan strukturon aŭ sian sidejon, povas iĝi kunlaborantaj grupoj de FEL kaj havi sian delegiton en la FEL-administrantaro. La kunlaborformo devas esti formulita en aparta konsentokontrakto akceptita de ambaŭ flankoj.

*Tiu ĉi regularo estas submetita al la FEL-estraro dum ĝia kunsido de la 19a de februaro 1995 kaj aprobita de ĝi. Ĝi estas poste submetita al la FEL-administrantaro je la 11a de marto 1995 kaj aprobita de ĝi post unu amendo.*
*Ĝi servu kiel gvidilo, kunigante kun la praktiko tiujn partojn de la Statuto de FEL kaj de la Regularo pri Interna Ordo en kiuj temas pri la lokaj grupoj.*
*Ĝi povas esti adapata, kiam duono de la estraro aŭ du trionoj de la administrantaro deziras tion.*





# *Regularo pri la Administrantaro*

## 1. KIO ESTAS LA ADMINISTRANTARO DE FEL?

Flandra Esperanto-Ligo (FEL) estas administrata de grupo de minimume kvin (ST. 9) el ĝiaj membroj, speciale komisiitaj pri tiu rolo. Tiuj personoj estas la administrantoj de la ligo kaj ili formas la administrantaron.
Kvankam la Ĝenerala Membrokunsido havas la plej altan decidpovon (1921), la administrantaro rajtas okupi sin pri ĉiuj aferoj, kiuj leĝe ne estas rezervitaj al tiu Ĝenerala Membrokunsido.
Ĉiujare dum la Ĝenerala Membrokunsido de marto la administrantaro estas konsistigata.
La sinokupadon pri ĉiutagaj kaj pri urĝaj aferoj la administrantaro rajtas transdoni al nelimigita (ST. 11) grupo de minimume kvin (ST. 11) el la administrantoj. Tiu grupo de komisiitoj estas la estraro.
La enoficigigon (normale ĉiujara) de tiu estraro estas unu el la ĉefaj taskoj de la administrantaro.

## 2. KIUJ ESTAS LA ADMINISTRANTOJ?

Ekzistas kvar kategorioj de administrantoj:
a. reprezentantoj de la de FEL dependantaj lokaj grupoj (RIO 3.1.1) (vidu sube, ero 3);
b. la jenaj funkciuloj, kiuj aŭtomate estas administrantoj:
- la direktoro(j) de la Flandra(j) Esperanto-centro(j);
- la ĉefredaktoro(j) de la periodaloj de FEL (ne necese de la periodaĵoj eldonataj de FEL) (RIO 3.1.2, dua streko);
- la reprezentanto de Flandra Esperantista Junulara Asocio (FIEJA);
c. unu reprezentanto (voĉdonrajta) de ĉiu kun FEL kunlaboranta faka asocio aŭ grupo (RIO 3.1.4) (vidu sube, ero 5);
ĉ. kooptitaj administrantoj (vidu sube, ero 4).

## 3. REPREZENTANTOJ DE LOKAJ GRUPOJ

a. Kiuj?

Reprezentanto(j) de loka FEL-grupo en la administrantaro havas principe oficon de unu jaro kaj estas tiu(j):
- kiu(j)n tiu grupo (post atentigo fare de la estraro aŭ de la Esperanto-centro de FEL) indikas en sia membraro antaŭ la fino de februaro; kaj
- pri kies elekto la sekretario (RIO 3.1.1) (aŭ komisie de li: la Esperanto-centro de FEL) je la fino de februaro estas ricevinta ateston subskribitan de du

estraranoj de tiu grupo. Se mankas tia atesto tiu grupo estas konsiderata kiel nereprezentata en la administrantarkunsido. Nerespondinta grupo rajtas unufoje en la jaro reprezentiĝi per la administranto(j) de la antaŭa periodo. Grupoj aliĝintaj post la marta kunsido rajtas je delegito nur je la venontmarta kunsido.

b. Kiom?

Unu administranto por ĉiu komenciĝinta kvindeko da membroj regule enskribitaj en tiu grupo je la 31a de decembro de la antaŭa jaro.

c. Kiaj?

La de la loka grupo indikita(j) persono(j) prefere estu tiu(j), kiu(j) pro siaj spertoj pri Esperanto aŭ per sia scio pri la Esperanto-movado aŭ pro sia rolo en la socio povas plej bone kontribui al la administrado de FEL. Necesas ankaŭ, ke ili povu veni al la administrantarkunsidoj.

ĉ. Kiom da tempo?

Ĉiu administranto el loka grupo rajtas reprezenti sian grupon dum ne pli ol dek sinsekvaj jaroj, inkluzive de la deka jaro. Li/ŝi rajtas repreni sian rolon post interrompo de minimume unu jaro. Dum la interrompo li/ŝi povas esti administranto laŭ unu el la tri aliaj kategorioj.
Administranto malĉeestinta sen valida motivo la administrantarkunsidon du fojojn en unu jaro estu anstataŭata de sia grupo en la venonta laborjaro.

## 4. DELEGITOJ DE KUNLABORANTAJ ORGANIZAĴOJ

Por la delegitoj de organizaĵoj kiuj havas iun kunlaborkonsenton kun FEL valoras la samaj reguloj kiel por la reprezentantoj de la lokaj grupoj. Ĉiu kunlaboranta organizaĵo rajtas tamen komisii nur unu delegiton. - Pri iuj kunlaborkondiĉoj (ekzemple financaj) FEL kaj la kunlaboranta organizaĵo interkonsentu ĉe la konsentodeklaro. Kondiĉoŝanĝoj bezonas la aprobon de ambaŭ grupoj.

## 5. KOOPTITAJ ADMINISTRANTOJ

a. Kiu?

Kooptita administranto estas tiu el la FEL-membraro
- kiu pro siaj meritoj en la Esperanto-movado aŭ en la socio indas aparteni al la administrantaro;
- kiun la estraro aŭ kiu ajn el la FEL-membraro proponas por tia elekto, se necese post atentigo pri la kvalifoj de tiu persono (rekte dum la elektokunsido aŭ per letero) aŭ kiu estas proponinta sin mem;
- kiu estas klare konsentinta pri sia kandidateco;
- kiun la Ĝenerala Kunsido akceptas per laŭkutima vocdono.





b. Kiel?

La estraro esploru en la periodo antaŭ la ĉiujara elekto, kiuj valoraj personoj estus pretaj kandidatiĝi por esti kooptitaj administrantoj. Kandidatigo aŭ kandidatiĝo tamen restas principe ebla ĝis la momento de la elekto.
La elektado povas okazi per aprobo de listo, kiun la estraro proponas. Sed se estas pli da kandidatoj ol la akceptebla nombro (vidu en "kiom?") aŭ se unu triono de la ĉeestantoj kaj reprezentitoj tion deziras, la elekto okazas per sekreta voĉdonado. La sinsekvo de la nombroj de la akiritaj voĉoj decidas pri la elektorezulto.
Se estas egaleco de voĉnombro por la indiko de la laste akirebla loko, nova voĉdonado devas okazi, sed nur rilate al la kandidatoj, kiuj estis akirintaj tiun egalan nombron. Se restas la egaleco, la voĉo de la prezidanto de la Ligo decidas.

c. Kiom?

La nombro de la per kooptado akceptitaj administrantoj devas minimume esti kvin, sed ĝi povus aliflanke ne superi la trionon de la suma nombro de la grupaj delegitoj plus la funkciuloj.

ĉ. Cetere valoras por la kooptitaj administrantoj la deziroj de punkto c de la delegitoj de la grupoj (vidu en ero 3) escepte de la dekjareco. Kooptita administranto malĉeestinta sen valida motivo la administrantarkunsidon du fojojn en unu jaro prefere ne plu estu rekomendata en la venonta laborjaro.

## 6. LA ADMINISTRANTARKUNSIDOJ

a. Kiom ofte?

La administrantaro kunsidas tiom ofte, kiom la estraro bezonas ĝian intervenon. Ĝi ankaŭ devas esti kunvokata, se almenaŭ kvin administrantoj postulas tion. Ĝi certe kunsidas en marto, prefere en kunligo kun la Ĝenerala Membrokunsido.

b. Kie?

La administantraro povas kunsidi kie ajn, tio laŭ decido de la estraro. Tamen la kunsido de marto devas okazi principe en la Esperanto-centro de FEL.

c. Kiel?

- La prezidanto invitas la administrantojn al administrantarkunsido per skribita alvoko. Escepte por urĝaj kunsidoj, la alvoko devas atingi ilin dekkvin tagojn antaŭ la kunsido kaj enhavi la tagordon.
- La sekretario preparas administrantarliston sur kiun la administrantoj, enirante la kunsidejon, metas sian subskribon apud sian nomon, tio sub kontrolo de la sekretario (aŭ de alia estrarano, se la sekretario ne povas sin okupi pri tio). Nur la personoj subskribintaj tiun liston voĉdonrajtas dum tiu kunsido.

- Dum FEL-administrantarkunsido laŭ libera elekto estas uzata la lingvo Esperanto aŭ la nederlanda lingvo.
- La raporto normale estas redaktata en Esperanto, krom se specialaj cirkonstancoj necesigus la uzon de la nederlanda. Normale la sekretario faras tiun raporton, sed tiu tasko povas ankaŭ esti plenumata de iu alia, se interkonsentite je la komenco de la kunsido. Ĉiu membro poste rajtas povi konsulti tiun raporton; plej praktike estas ke li/ŝi por tio direktu peton al la FEL-sekretario.

ĉ. Se administranto ne povas ĉeesti la kunsidon, li/ŝi rajtas transdoni sian voĉdonrajton al alia administranto per skriba deklaro al la sekretario aŭ per deklaro, kiun minimume tri aliaj administrantoj povas atesti. Tiu administranto estas konsiderata kiel ĉeestanta.

d. Administrantarkunsido nur povas preni decidojn, se minimume duono de la administrantaro ĉeestas aŭ estas reprezentata. Decido validas, se ĝi akiris minimume duonon de la voĉoj de la ĉeestantaj aŭ reprezentataj administrantoj.

e. La estraro povas ankaŭ peti la opiniojn de la administrantoj per ĝenerala letero kaj inviti ilin al voĉdonado per skribaj respondoj, indikante limdaton por la respondo. La decido validas, se duono de la administantoj estas respondintaj antaŭ tiu dato kaj se duono de la respondoj subtenas la proponon.

f. Honoraj membroj de FEL estas invitataj al ĉiuj administrantarkunsidoj, kie ili povas partopreni per siaj konsiloj, sed sen havi voĉdonrajton.

g. Al administrantarkunsido povas esti allasataj kiel konsilantoj tiuj personoj, kiuj estas invititaj de la prezidanto.

ĝ. Administrantoj kaj invititaj konsilantoj, kiuj partoprenis al kunsido je pli ol 20 km de sia loĝloko, rajtas principe pri iu repago de siaj veturkostoj, kaj tio laŭ la tarifo de la publika trafiko. Estas la tasko de la estraro decidi ĉiujare antaŭ la ĉefkunveno kiumaniere kaj kiugrade la kaso de FEL ebligas, ke la kostoj de la pasinta jaro estu rekompencataj.

h. Por ĉiu administrantarkunsido estu antaŭviditaj minimume du horoj.

*Tiu ĉi regularo estas submetita al la FEL-estraro dum ĝia kunsido de la 15a de oktobro 1994 kaj aprobita de ĝi. Ĝi estas poste submetita al la FEL-administantaro je la 27a de januaro 1995 kaj aprobita de ĝi.*
*Ĝi estas de ambaŭ konsiderata kiel praktika teksto, kuniganta tiujn partojn de la Belga Leĝo de la 27 de junio 1921 pri a.s.p.c., de la Statuto de FEL kaj de la Regularo pri Interna Ordo en kiuj temas pri la administantaro.*
*Ĝi povas esti adaptata, kiam du trionoj de la estraro aŭ duono de la administantaro deziras tion.*





## *Regularo pri la Estraro*

### 1. KIO ESTAS LA ESTRARO?

Konsciante, ke administras la Flandran Esperanto-Ligon (FEL) ĝia administrantaro, sed ke pro praktikaj kaŭzoj tiu administrantaro rajtas transdoni la sinokupadon pri ĉiutagaj kaj urĝaj aferoj al limigita grupo de siaj anoj, ekzistas tiu grupo, kiu estas la estraro de FEL.
Tiu estraro konsistas el minimume kvin FEL-administrantoj kaj ĝi estas enoficigata principe dum la administantarkunsido, kiu sekvas post la ĝenerala membrokunsido de marto. - Se dum tiu kunsido de marto la nombro de kvin estraranoj ne estas atingita, la administrantaro mem provizore okupas sin pri ĉiuj aferoj, ĝis kiam nova administrantarkunsido povas instali kompletan estraron; en tiu speciala kazo la administrantaro elektas por tiu periodo nur provizoran prezidanton.

### 2. KIU POVAS IĜI ESTRARANO?

Estrarano povas iĝi kiu ajn FEL-membro, kiu
- estas komunikinta sian kandidatiĝon por (jes aŭ ne difinita) estrarfunkcio al la sekretario de la antaŭa FEL-estraro;
- apartenas al la administrantaro, kiu faras tiun estrarelekton;
- ne apartenas al la dungitoj de FEL aŭ al la honora membraro;
- havas bonan scion de la lingvo Esperanto skribe kaj parole.

La administrantoj elektas siajn estraranojn inter la kandidatoj, tio laŭ la proceduro formulita en la regularo pri la administrantaro.

### 3. FUNKCIOJ EN LA ESTRARO

Kvar funkcioj estas klare difinitaj inter la estraranoj (ST. 11): prezidanto, vicprezidanto, sekretario, kasisto. - La prezidanto estas rekte kaj surloke elektata de la administrantaro (ST. 11); pri la aliaj funkcioj la estraranoj mem decidas, ĉu tuj post la elekto, ĉu en la unua kunsido de la nova estraro.

a. La prezidanto

- estas elektata de la administrantaro, eĉ se ne ekzistas elektita estraro (vidu en ero 1, dua alineo);
- prezidas principe la kunsidojn de la estraro, de la administrantaro kaj de la membroj;
- povas reprezenti la ligon, kie kaj kiam tio necesas;
- respondecas pri la ĝenerala funkciado de la ligo.
La mandato de prezidanto estas limigata al maksimume kvin sinsekvaj jaroj (ST. 11), sed post interrompo de minimume unu jaro li/ŝi rajtas rekandidatiĝi.

b. La vicprezidanto

- estas la ĉefa konsilanto de la prezidanto;
- anstataŭas la prezidanton, kiam tio necesas.

c. La sekretario

- respondecas pri la ĝeneralaj korespondaĵoj kaj invitiloj al la membroj, administrantoj kaj estraranoj;
- respondecas pri la raportoj kaj pri la arĥivoj.
Per decido de la estraro iuj partoj de la taskoj de la sekretario povas esti translasataj al la Esperanto-centro de FEL aŭ al iu alia estrarano, kiu pri tio konsentas (RIO 4.2., 4.3).

ĉ. La kasisto

- supervidas la enspezajn kaj elspezajn kontojn de FEL;
- prezentas je la aprobo de la ĝenerala membrokunsido la bilancon de la finiĝinta jaro kaj la buĝeton de la nova jaro.
Per decido de la estraro iuj partoj de la taskoj de la kasisto povas esti translasataj al la Esperanto-Centro de FEL post interkonsento kun ties direktoro, aŭ al iu administranto, kiu pri tio konsentas.

d. Aliaj estraranoj

- povas prizorgi specifajn taskojn laŭ interkonsento inter la estraranoj (RIO 4.3).

**4. LA MANDATO**

a. La mandato de la estraro estas de unu jaro kaj daŭras principe ĝis la elekto de nova estraro; ĝi finiĝas, kiam la nomoj de la novaj estraranoj estas komunikataj. Ĝi ankaŭ finiĝas, se la nombro de estraranoj pro iu ajn kaŭzo ne plu atingus kvin.

b. Estrarano povas eliri el la estraro antaŭ tiu dato, se
- la administrantaro konsentas pri tio;





- la nombro de estraranoj per tiu eliĝo ne iĝos malpli ol kvin;
- la eliro de tiu estrarano ne kaŭzus problemojn por FEL.
La administrantaro rajtas en tia kazo elektigi anstataŭantan estraranon dum la koncerna aŭ dum sekvanta administantarkunsido, se prezentiĝas kandidato(j) dum tiu kunsido.

c. La administrantaro rajtas dum kunsido eksigi estrararon antaŭ tiu dato, se ekzistas specialaj kaŭzoj por tio; ĝi rajtas dum tiu kunsido elekti anstataŭanton se prezentiĝas kandidato(j).

ĉ. La prezidanto, vicprezidanto, sekretario kaj kasisto povas esti liberigataj de sia specifa funkcio je propra propono, sed nur:
- se alia estrarano, prefere sen specifa funkcio, pretas preni tiun taskon sur sin;
- se pli ol la duono de la estraro konsentas pri tiu ŝanĝo;
- se ankaŭ la administrantaro konsentas pri tio.

d. Personoj elirantaj el la estraro tamen rajtas resti administrantoj ĝis la sekvonta ĝenerala membrokunsido.

e. Se pro kiu ajn cirkonstanco la nombro de estraranoj malsuperas kvin, la administrantaro devas esti kunvokata ene de unu monato cele de elekto de kvina estrarano.

**5. LA ESTRARKUNSIDOJ**

a. Dum la jaro pluraj estrarkunsidoj okazas, principe unu en ĉiu monato; en specialaj cirkonstancoj ili povas esti pli multnombraj, kaj en la somera periodo ili povas esti malpliaj.

b. Estrarkunsido prefere okazu en la Esperanto-centro en Antverpeno. Ĉiu estrarano rajtas unufoje en la jaro inviti ĝin al sia urbo aŭ regiono, se li/ŝi povas disponigi tie konvenan, senpagan kaj facile atingeblan kunvenlokon. Krome la prezidanto rajtas okazigi estrarkunsidojn okaze de kiu ajn speciala aranĝo de la Esperanto-movado en kaj ekster Flandrio, favorante tiel la cirkonstancojn de renkontiĝoj inter estraranoj kaj FEL-membroj.

c. La estraro decidas pri loko, dato kaj horoj de la sekvonta(j) estrarkunsido(j). Devas montriĝi, ke almenaŭ la duono de la estraro, inter kiuj la prezidanto aŭ la vicprezidanto, povos antaŭvidi sian partoprenon.

ĉ. La prezidanto povas je propra iniciato aŭ je peto de du estraranoj inviti al estrarkunsido, aŭ al parto de ĝi, kiun ajn personon, kiu povus doni specialajn konsilojn aŭ interesajn opiniojn pri iu pritraktota punkto. - La direktoro de la Esperanto-centro de FEL estas principe ĉiam invitata kiel konsilanto (do sen decidrajto), krom en la kazoj, kiam la estraro decidus, ke li prefere ne partoprenu en parto aŭ en la tuto; la Esperanto-centro-direktoro povas ankaŭ lasi sin anstataŭi, se li estas malhelpata.

d. La estraranoj partoprenu kiel eble plej regule en la kunsidoj, krom se ili havas iun valoran malĉeestokaŭzon. Estrarano, kiu ne estas partopreninta en pluraj kunsidoj aŭ ofte estas alveninta tro malfrue, meritas esti malrekomendata dum la sekvonta estrarelekto.

e. La estrarkunsido pritraktas:
1. la aferojn, kiujn la administrantaro komisiis al la estraro;
2. la decidojn pri ĉiutagaj aferoj de la ligo;
3. aferojn de informado, gazetaraj kaj ekspoziciaj servoj, kursoj, eldonadoj (RIO 4.1);
4. aferojn, pri kiuj ĝi fakte ne estas komisiita de la administrantaro, sed kiuj havas iun urĝan sencon, kaj pri kiuj ĝi poste raportos al la administrantaro kaj petos ĝian verdikton;
5. konfirmojn aŭ malkonfirmojn de decidoj de la komisionoj;
6. konsilojn de la komisionoj kaj decidojn surbaze de tio.

f. La prezidanto redaktas la tagordon de la kunsido kaj havigas ĝin al la estraranoj kaj invititoj; je la komenco de la kunsido iu ajn estrarano povas proponi aldoni tagordopunktojn.

g. La decidoj estas prenataj per plimulto de la voĉoj de la ĉeestantaj estraranoj; se iu petas tion, la voĉdonado povas esti farata per sekreta formo; se en decido du voĉnombroj egalas, la opinio de la prezidanto estas decida; se tamen du estraranoj pro serioza motivo ne povis partopreni en tiu kunsido, tiu per egalvoĉeco decidita punkto devas reveni por rekonsidero en sekvonta estrarkunsido, se iu el la estraranoj postulas tion dum la kunsido mem.

ĝ. Dum la estrarkunsidoj oni prefere parolu Esperanton, sed ĉiu ĉeestanto rajtas paroli la nederlandan, se li/ŝi preferas esprimi siajn ideojn tiel; la raporto prefere estu redaktata en Esperanto, krom se specialaj cirkonstancoj necesigas, ke ĝi prefere estu redaktata en la nederlanda.

h. Kiam la financa stato de FEL ebligas tion, la vojaĝkostoj de estraranoj, kiuj venas de distanco de pli ol 20 km, povos esti repagataj, sed nur laŭ maniero pri kiu la estraro mem estos decidinta.

*Tiu ĉi regularo estas submetita al la FEL-estraro dum ĝia kunsido de la 19a de februaro 1995 kaj aprobita de ĝi. Ĝi estas poste submetita al la FEL-administrantaro je la 11a de marto 1995 kaj aprobita de ĝi.*
*Ĝi estas de ambaŭ konsiderata kiel praktika teksto, kuniganta kun la praktiko partojn de la Belga Leĝo de la 27a de junio 1921, de la Statuto de FEL kaj de la Regularo de Interna Ordo.*
*Ĝi povas esti adaptata, kiam duono de la estaro aŭ duono de la administrantaro deziras tion.*





## Regularo pri la Proceduro de la Estrarelektoj

### A. LA ALVOKO

Ĉiujare, ekzemple per teksto en la unua numero de la FEL-revuo(j), sed certe antaŭ la mezo de februaro, la estraro
1. invitas la membraron de FEL al la Ĝenerala Membrokunsido, kiu okazu iun tagon de marto fiksitan de la estraro, kaj dum kiu estas konsistigata, danke al la elekto de iu nombro de kooptitaj administrantoj, la nova administrantaro de FEL;
2. invitas la novan administraron al ĝia unua kunsido, kiu prefere okazu tuj post la Ĝenerala Membrokunsido. Pro la fakto, ke tiu unua kunsido celas la elektadon de prezidanto kaj de nova estraro, ĝi nomiĝas elektokunsido;
3. alvokas kandidatiĝi por estrarfunkcioj.

### B. KANDIDATIĜO

1. Rajtas kandidatiĝi por funkcioj de estrarano ĉiuj membroj de FEL apartenantaj aŭ supozeble apartenontaj al la nova administrantaro, escepte de tiuj, kiuj estas honoraj membroj kaj tiuj, kiuj okupas salajratan funkcion en la sino de FEL.

2. Kandidatoj konatigu sin per skriba deklaro, pri kiu la FEL-sekretario disponu plej laste 24 horojn antaŭ la elektokunsido. Jam je tiu okazo la kandidatoj povas esprimi preferon por iu(j) el la estrarfunkcioj. Se la nombro de sinprezentintaj kandidatoj ne atingas minimume kvin, aŭ se specialaj kondiĉoj ne estas plenumitaj, novaj kandidatoj estas akceptataj ĝis la momento de la elekto.

3. Ĉiuj kandidatoj ricevu de la sekretario ekzempleron de la regularo pri la estraro. Per tiu ili konsciu, ke ili devos dedici sin serioze al tia tasko kaj devos partopreni la estrarkunsidojn, plej ofte en la Esperanto-centro en Antverpeno. - La kandidatoj ankaŭ konsciu, ke bona scio de la lingvo Esperanto estas necesa por aktive partopreni en la kunsidoj.

4. La nombro de kandidatoj ne estas limigita, sed devas atingi minimume kvin.

5. La kandidatoj rajtas kiam ajn retiriĝi.

## C. LA ELEKTOPREZIDANTO

1. La elektokunsidon prezidas elektoprezidanto, kiu estas persono, kiu ne kandidatiĝas por estrarfunkcio. Principe tiu persono estus la prezidanto de la finiĝanta estraro; se tio neeblas, prenas sur sin tiun taskon respektive la vicprezidanto, la sekretario, la kasisto, la plej aĝa de la aliaj ĉeestantaj estraranoj de la finiĝanta estraro.

2. Se neniu estrarano povas elektoprezidanti kaj se iama(j) FEL-prezidanto(j) ĉeestas, la plej aĝa inter tiuj estas petata preni sur sin tiun taskon.

3. Je manko de tiaj personoj, la direktoro de la Esperanto-centro de FEL laŭofice plenumas tiun taskon.

## Ĉ. LA NECESA NOMBRO DE KANDIDATOJ

La elektoprezidanto laŭtlegas la kandidatliston kaj konstatas, kiuj el tiuj kandidatoj estas anoj de la nova administrantaro.

1. Se estas malpli ol kvin kandidatoj:
En tiu kazo la elektoprezidanto alvokas la ĉeestantajn administrantojn por ke iu(j) inter ili kandidatiĝu; je tiu okazo li ankaŭ atentigu, ke prefere prezentu sin kandidatoj, kiuj ebligas, ke estu plenumataj danke al ili iuj specialaj kondicoj. Se post tri insistoj restas malpli ol kvin kandidatoj entute, eblas nur la elekto de provizora prezidanto (kiu prefere estu la antaŭa prezidanto) kaj la estrarelekto prokrastiĝas ĝis venonta sesio, kiu eble povas okazi pli poste en la sama tago.

2. Se estas minimume kvin kandidatoj sed iuj specialaj kondiĉoj ne estas plenumitaj:
la elektoprezidanto alvokas, ke kandidatiĝu iu(j), kiu(j) povus per sia kandidatiĝo solvi la problemon de la koncerna speciala kondico; se post tri insistoj neniu estas prezentinta sin, oni ne plie insistas kaj oni komencas la estrarelekton.

3. Se estas minimume kvin kandidatoj kaj la specialaj kondiĉoj estas plenumitaj, la elekto povas senprobleme okazi.

## D. PREZENTADO DE LA KANDIDATOJ

Je invito de la elektoprezidanto la kandidatoj mallonge prezentas sin al la administrantaro kaj indikas siajn intencojn. Post tio kiu ajn administranto aŭ speciala invitito, kun permeso de la elektoprezidanto, rajtas eldiri rekomendojn aŭ obĵetojn aŭ fari konkretajn demandojn al iu kandidato.
La elektoprezidanto denove atentigu pri specialaj cirkonstancoj, kiuj eble necesigus elekton de iuj kandidatoj.





## E. ELEKTADO

Antaŭa aranĝo

Surbaze de la nombro de kandidatoj kaj de ilia konjektata valoro, la administrantoj unue decidas pri la nombro de elektotaj estraranoj. Konsilinde estas, pro praktikaj kialoj, ke tiu nombro ne superu ok, eĉ se estas pli da kandidatoj. La decido pri la nombro okazu per manlevo; tiucele la elektoprezidanto citas unue la nombron mem de la kandidatoj, kaj poste sinsekve malaltigas ĝin ĝis kiam iu nombro akiras la aprobon de duono de la rajtigita elektantaro, sed minimume kvin.

1. Simpla proceduro

Se la nombro de kandidatoj egalas al la interkonsentita nombro kaj se iuj inter ili plenumas la necesajn kondicojn, la elektoprezidanto proponas al la administrantaro elekti laŭ la simpla maniero, nome akcepti la tutan kandidataron kiel novan estraron. Tiel fariĝos, se du trionoj de la elektorajtantoj per manlevo konsentas pri tio.
Se tiu maniero ne estas akceptata, la proceduro daŭriĝas laŭ ero 2 ĉi-sube.

2. Normala proceduro

Se la nombro de kandidatoj estas pli ol ok aŭ se la malplia nombro ne estas akirinta la simplan aprobon
- la kunsido estas interrompata por ebligi al la elektantoj interparoli kaj konscii, ke retiriĝo ciam eblas;
- dum tiu interrompo la nomoj de la kandidatoj estas alfabete listigataj sur tabulo aŭ granda papero;
- post tiu interrompo la elektoprezidanto demandas, ĉu iu deziras ankoraŭ fari iun deklaron; post tio oni transiras al la sekreta balotado.
Sekreta balotado signifas, ke ĉiu elektorajtanto ricevas slipeton per kiu li povas esprimi sian preferon. Se iu estas espriminta la deziron antaŭe, tiuj slipetoj estas numeritaj kaj, se dezirite, subskribitaj de la FEL-sekretario; ilia plej alta nombro devas egali al tiu de la registritaj elektorajtantoj.
- ĉiu elektanto skribas sur sian slipeton la nomo(j)n de la kandidato(j), kiu(j)n li/ŝi preferas kiel estrarano(j), sed ne pli ol estas la interkonsentita nombro. - Validas nur la korekte plenigitaj balotslipetoj.
La sekretario aŭ alia tiucele indikita persono, kun la helpo de maksimume tri nekandidatoj, kolektas kaj nombras la balotslipetojn kaj faras pri la rezulto raporteton, kiu devas esti konfirmata de la helpantoj, kaj kiun li/ŝi transdonas al la elektoprezidanto.
Tiu ĉi laŭtlegas la nomojn de tiuj kandidatoj, kiuj akiris minimume la duonon de la voĉoj kaj la nomojn de la aliaj. Nur tiuj, kiuj akiris tiun duonon estas per tio elektitaj. Se ilia nombro ne atingas tiun de la interkonsentita nombro, oni devas daŭrigi la elekton, sed maksimume du fojojn.

Se por la lasta nombro de elekteblaj estraranoj du (aŭ pliaj) kandidatoj estas akirintaj la saman nombron da voĉoj, nova sekreta baloto okazu por decidi, kiu inter la du estu elektata; se denove estas egaleco de voĉoj, la plej aĝa estas elektita.

3. Plia voĉdonado

Nur se la nombro de la per tiu proceduro elektitaj estraranoj restas malpli ol kvin, aŭ se tiu nombro ne enhavas la necesajn estranarojn por plenumi iujn specialajn kondiĉojn, la elektoprezidanto proponas kompletigan balotadon inter la neelektitaj kandidatoj, kiu okazos laŭ la sama proceduro.
Se post tiu nova elekto la nombro de valide elektitoj tamen restas malpli ol kvin aŭ se la specialaj kondiĉoj ne estas plenumitaj, la tuta proceduro rekomenciĝas.
Se post tri provoj oni ne atingis la necesan nombron, sekvas invito al nova elektokunsido en la venontaj semajnoj aŭ pli poste en la tago. La estraranoj elektitaj dum la unua elektokunsido ne plu devas kandidatiĝi por tiu nova elektosesio, sed ilia mandato ne ekfunkcias tiel longe, ke kompleta estraro ne ekzistas.

## F. ELEKTO DE LA PREZIDANTO

1. Kiu?

- La administrantoj elektas la novan prezidanton inter la nove elektitaj estraranoj.
- Prezidanto, kiu jam plenumis tiun funkcion dum kvin sinsekvaj jaroj, ne rajtas kandidatiĝi sen interrompo de almenaŭ unu jaro.
- La kandidato devas kapabli bone esprimi sin en Esperanto, parole kaj skribe.

2. Kandidatiĝo kaj voĉdonado

La elektoprezidanto laŭtlegas la nomo(j)n de la kandidato(j) por la prezidanteco kaj konstatas kiu(j)n inter ili estas valida(j) kandidato(j) sekve de aparteno al la novelektita estraro.

a. se estas nur unu kandidato:
- la elektoprezidanto proponas unue sekretan aprobon; se per manlevo unu triono de la elektorajtantoj subtenas tiun sekretan aprobon, oni agos laŭ la proceduro indikita ĉi-supre en E.2;
- se malplia nombro estas petinta tiun sekretan voĉdonadon, la elektoprezidanto proponas, ke la administrantaro indiku per manlevo, ĉu ili jes aŭ ne akceptas la proponitan prezidanton; tiu ĉi estas konsiderata elektata, se pli ol la duono de la elektorajtantaj aprobas lin/ŝin;
- se la kandidato akiras tiun duonon de la voĉoj, la elektoprezidanto povas proklami la novan prezidanton;





- se la kandidato ne akiras tiun necesan duonon, oni agos kiel indikate sub c ĉi-sube.

b. se estas pli ol unu kandidato:
- la kandidatoj ricevas la okazon prezenti sin mem kaj siajn ideojn per iu alparolo;
- ĉiu el la administrantoj kaj specialaj invititoj rajtas rekomendi iun kandidaton kaj fari demandojn aŭ obĵetojn;
- poste okazas sekreta balotado laŭ la maniero indikita en E.2;
- la kandidato akirinta favoran duonon de la voĉaro de la administrantoj povas esti proklamata kiel elektita; se necese oni refaru la balotadon inter la du plej bone klasifitaj kandidatoj ĝis kiam iu akiras la duonon.

c. se ne estas kandidato aŭ se la sola kandidato ne estas akirinta plimulton: speciala provo por elekti prezidanton estas farata inter la novaj estraranoj, kaj rekte per sekreta voĉdonado, kiu konformas al tiu de ero E.2.
- tiucele ĉiu elektorajtanto skribas sur ricevitan slipeton la nomon de la de li/ŝi preferita persono;
- al la estrarano, kiu estas ricevinta la plej altan vocnombron, sed minimume duonon de la voĉoj, la elektoprezidanto demandas, ĉu li akceptas la verdikton; la elektita persono rajtas rifuzi;
- en kazo de akcepto tiu persono estas proklamata;
- en kazo de rifuzo aŭ de hezito oni rekomencas tiun elektomanieron, sed sen la malakceptinta kandidato, ĝis kiam iu preferita persono, akirinta duonon de la voĉoj, senhezite akceptas; la nombro de sinsekvaj provoj tamen entute ne superu tri;
- se tiaj elektoj ne donas rezulton, la elektoprezidanto petas al la pasintjara prezidanto provizore daŭrigi sian funkcion ĝis sekvonta elektosesio, kiu eĉ povas okazi je la sama tago.

## G. INSTALADO DE LA NOVA ESTRARO

Se kompleta estraro ekzistas kaj prezidanto estas elektita, okazas jeno:
a. la elektoprezidanto instalas la novan prezidanton kaj la novan estraron;
b. la nova prezidanto alparolas la ĉeestantaron; poste ankaŭ la estraranoj en alfabeta sinsekvo alparolas kaj povas jam esprimi intencon pri rolo en la estraro;
c. la nova prezidanto interrompas la kunsidon kaj retiriĝas dum kelkaj minutoj kun la estraranoj por interkonsenti pri iuj aferoj, ekzemple provizora aŭ definitiva divido de funkcioj en la estraro;
ĉ. reveninte en la salonon la estraranoj respondas je eblaj demandoj de la ĉeestantoj;
d. la kunsido finiĝas.

### H. EBLAJ PROTESTOJ

Eblaj protestoj kontraŭ la elektoj devas esti skribe formulataj ene de du semajnoj post la elektotago kaj esti sendataj al la direktoro de la Esperanto-centro. Ene de unu monato la administrantaro devas esti kunvokata por decidi pri la valoro de la protesto kaj konkludi pri ĝi.

*Tiu ĉi regularo, en sia nova versio, estas submetita al la FEL-estraro dum ĝia kunsido de la 19a de januaro 1995 kaj aprobita de ĝi. Ĝi estas poste submetita al la FEL-administrantaro je la 25a de februaro 1995 kaj aprobita de ĝi post ŝanĝo de parto de unu frazo.*
*Ĝi estas de ambaŭ konsiderata kiel praktika teksto, kuniganta tiujn partojn de la Belga Leĝo de la 27a de junio 1921 pri a.s.p.c., de la Statuto de FEL kaj de la Regularo pri Interna Ordo en kiuj temas pri la administrantaro, la estraro kaj la prezidanto.*
*Ĝi povas esti adaptata, kiam du trionoj de la estraro aŭ duono de la administantaro deziras tion.*

*Noto:*
*La jen submetita versio, en formo de tajpita teksto kun jam kelkaj korektoj kaj aldonaĵoj estis sendita al la administrantoj je la komenco de februaro 1995.*
*La estrarkunsido de la 19a de februaro faris amendojn en la punktoj B.2 (unuaj du linioj) kaj en E.2, 4a alineo, du lastaj linioj, kaj korektigis kelkajn tajperarojn aŭ misskribaĵojn. La administrantarkunsido de la 25a de februaro amendis la lastan frazparton de E.*





## Regularo pri la Komisionoj

### 1. PRINCIPOJ

a. En la sino de Flandra Esperanto-Ligo (FEL) ekzistas komisionoj, kiuj okupas sin pri specifaj taskoj rilate al la funkciado de la organizaĵo kaj al la progreso de Esperanto. Ĉiu komisiono havas sian difinitan agadkampon, kiun la FEL-estraro konfidas al ĝi, kaj laboras sub la respondeco de persono, kiu prefere estu iu FEL-estrarano.
b. Komisiono ĉefe havas konsultan kaj konsilan rolon, sed ĝi povas ankaŭ decidi plenumi urĝajn aferojn sub la respondeco kaj kun la konsento de la estraro (kiel eksplikate en punkto 2.c); la ĝenerala plenumado de la proponoj de komisiono apartenas al la rolo de la estraro, kiu, eventuale post konsulto de aliaj komisionoj (speciale tiu de financoj), decidos kiujn sekvojn ĝi donos al la proponoj.
c. Aparteno al komisiono neniel povas esti konceptata kiel honorfunkcio, sed estas libervole akceptita sindevigo al aktiva sindedico al la progreso de Esperanto.

### 2. LA RESPONDECO DE LA ESTRARO

a. Por ĉiu komisiono la FEL-estraro komisias prefere unu el siaj anoj responsi pri ĝi. La decido pri tia komisio estas prenata dum estrarkunsido kaj nur post la konstato, ke iu(j) el la estraranoj ŝatas gvidi la koncernan komisionon; tia decido povas esti prenata per sekreta voĉdonado, se unu el la estraranoj deziras tion.
b. Se inter la estraranoj mankas kandidato por responsi pri komisiono, la estraro povas peti al iu kompetenta administranto preni tiun taskon sur sin. Se tiu malakceptas, oni petos al alia, ĝis kiam iu akceptas. Tiu eksterestrara komisionestro havas la samajn rajtojn kaj devojn kiel komisionestro el la estraro. Li/ŝi estos invitata al estrarkunsidoj, se pritraktiĝos aferoj de la koncerna komisiono.
c. La komisiito estas komplete libera decidi kiujn personojn li/ŝi enprenas en la komisionon, sed devas respekti la postulojn de la punktoj 3a kaj 3b. Kiel ajn, oni konsciu, ke por tiu elekto estas avantaĝe, ke tiu estrarano unue akiru konsilojn kaj rekomendojn de estraranoj kaj de administrantoj; ankaŭ estas avantaĝe, ke la anoj de iu komisiono ne loĝu tro dise tra la lando por ke ekzistu iu probableco, ke ili povu senprobleme partopreni en la komisionkunsidoj.

### 3. KONSISTO

a. Komisiono konsistas prefere el minimume tri kaj maksimume kvin personoj; tiuj devas principe esti membroj de Flandra Esperanto-Ligo (t.e. ĉu rekte, ĉu pere de loka grupo) krom se necesas la enpreno de iu rekomendita spertulo.
b. En la komisiono prefere enestu minimume unu estrarano de FEL kaj minimume unu alia administranto de FEL.
c. La komisiono povas ekfunkcii de kiam tri personoj apartenas al ĝi. Komisionano, kiu poste envenas por kompletigo aŭ por anstataŭo de foriranto devas akcepti la opiniojn, kiujn la komisiono jam antaŭe estas alprenintaj.

### 4. FUNKCIADO

a. La komisionestro invitas la komisionanojn al kunsido kaj faras tion prefere dekkvin tagojn antaŭe. Li/ŝi decidas pri la loko, tago kaj horo, sed nur post konsultado de aliaj komisionanoj, tio por povi garantii la necesan kvorumon de duono de la komisiono. Li/ŝi ankaŭ konigu al la komisionanoj, kiuj punktoj ĉefe estos traktataj.
b. La kunsidoj de la komisiono estas principe prezidataj de la koncerna estrarano aŭ komisiita persono, sed li/ŝi povas transdoni dum la kunsido la prezidon al alia komisionano; la prezidanta persono indikas raportanton de la kunveno.
c. Dum la komisionkunsido diversaj punktoj estas pritraktataj kaj opinioj estas esprimataj. Decidoj povas nur esti farataj, se minimume la duono de la komisionoj ĉeestas; tiaj decidoj devas akiri la konsenton de plimulto de la partoprenantoj. La plej gravaj opinioj (kaj eventuale la kontraŭ-opinioj) kaj decidoj estas notataj en la raporto, kiu estos poste transdonata al la prezidanto de FEL (kiu transdonos ĝin al la estraro).
ĉ. Se necesas havi pliajn aŭ pli celtrafajn informojn aŭ se oni devos disponi pri dokumentoj, iu(j) komisionano(j) povas preni sur sin specialajn taskojn tiurilatajn, sed ili devos ilin plenumi. Ankaŭ oni povas inviti spertulojn al iuj komisionkunsidoj, sed tiuj havas nur informan rolon kaj la komisiono restas libera en la starpunktoj, kiujn ĝi alprenas.
d. La laboro en la komisiono estas konsiderata kiel libervola agado, kiu ne estas rekompencata. La FEL-estraro povas decidi, ke iuj kostoj de korespondado, telefonado, akirado de dokumentoj, vojaĝoj k.a. povus esti repagataj, en tiu senco, ke la pagoj povas nur esti farataj, se ili estis anticipe esprimitaj.
e. Opinioj, rekomendoj, konsiloj k.a., kiuj rezultas el telefonado aŭ korespondado aŭ interparoloj inter komisionanoj, nur povas akiri validecon, se ili poste estas konfirmataj de komisionkunsido.
f. Komisiono havas kunsidojn laŭ la bezonoj, sed minimume po unu jare. Ĝi devas kunsidi, kiam la estraro deziras iujn opiniojn de ĝi antaŭ iu difinita dato.
g. Raporto de komisionkunsido devas esti redaktata plej laste dek tagojn post la kunsido kaj unu ekzemplero de ĝi devas tuj esti transigata al la FEL-prezidanto por ke ĝi estu pritraktata dum la sekvonta estrarkunsido. Se iuj decidoj de la komisiono necesigas baldaŭan plenumon kaj povus havi implikojn





sur la financoj aŭ la reputacio aŭ la funkciado de FEL kaj se montriĝas, ke estrarkunsido ne okazos ene de la dek tagoj post la finredakto de tiu raporto, tiam la raporto estos sendata al ĉiuj estraranoj kun la peto, ke ili reagu pri la kontesteblaĵoj ene de la dek sekvontaj tagoj. Se post tiuj dek tagoj ne estas alveninta iu malfavora reago, la komisiono povas plenumi sian decidon.

### 5. DEVOJ DE KOMISIONANO

a. Komisionano devas akurate plenumi la taskojn, kiujn li/ŝi prenis sur sin, ekzemple kolekti la necesajn informojn aŭ dokumentojn, ilin transdoni al la estrarano, redakti raportojn pri specialaj aferoj; li ankaŭ devas regule partopreni en la kunsidoj de la komisiono.
b. Komisionano povas eksiĝi kiam ajn el la komisiono, tio per simpla komuniko al la koncerna estrarano.
c. Komisionano povas esti eksigata el la komisiono je decido de la estraro en unu el jenaj cirkonstancoj:
1. se li/ŝi ne estas partopreninta kvin kunsidojn (ne necese sinsekvajn) de la komisiono;
2. se li/ŝi trifoje ne ĉeestis sen esti antaŭe komunikinta sian neeblecon partopreni;
3. se pli ol la duono de la komisionanaro opinias, ke li/ŝi neniel kontribuas al la funkciado de la komisiono aŭ malutilas al ĝi;
4. se la komisionano ne plu estas membro de FEL.
ĉ. Eksigita komisionano povas nur esti reprenata en la komisionon, se li/ŝi klare povas montri, ke liaj/ŝiaj vivcirkonstancoj nun permesas pli aktivan partoprenon.
d. Se komisionano havas plendojn pri la funkciado de la komisiono, li/ŝi estas invitata direkti ilin rekte al la prezidanto de FEL. Eksigita komisionano ankaŭ faru tiel.

### 6. MALESTIGO DE KOMISIONO

Komisiono restas principe ekzisti dum la sinsekvaj jaroj, sed ĝi povas malaperi aŭ esti ŝanĝata en jenaj kazoj:
a. se ĝi ne plu konsistas el tri membroj, kiuj konformas al la postuloj de la punktoj 3a kaj 3b, kaj se dum periodo de du monatoj la komisionestro ne sukcesas trovi novan komisionanon;
b. se la koncerna respondeculo ne plu apartenas al la FEL-administrantaro;
c. se la tuta komisiono opinias, ke ĝi estas plenuminta sian taskon kaj de tiam ne plu bezonas ekzisti;
ĉ. se la estraro decidas nuligi la komisionon aŭ decidas transformi ĝin.

*Tiu ĉi regularo estas submetita al la FEL-estraro dum ĝia kunsido de la 13a de aŭgusto 1994 kaj aprobita de ĝi. Ĝi estas poste submetita al la FEL-administrantaro je la 11a de marto 1995 kaj aprobita de ĝi.*
*Ĉiu nova estraro, kun permeso de la administrantaro, rajtas adapti ĝin, se ĝi opinias tion oportuna.*

**Pli preciza indikado de la agadkampoj:**

Komisiono pri Informado:
Kontaktoj kun gazetaro, radio, televido
Kontaktoj kun gravuloj por informi ilin
Rebatado de negativaj esprimoj rilate esperanton
Konsistigado de informa materialo
Serĉado de konvenaj cirkonstancoj por informi
Bibliotekoj kaj informcentroj
Bultenejoj (BBS)

Komisiono pri Ekster-FEL-aĵoj:
Kontaktoj kun UEA
Kontaktoj kun Esperanto-organizaĵoj ekster Flandrio
Eldonado de libroj
Rolo de "Monato"
Presejo de FEL

Komisiono pri Instruado:
Organizado de Esperanto-kursoj
Formado de kvalifitaj esperanto-instruantoj
Formado de aktivuloj kaj propagandistoj
Kolektado de informoj pri la rezultoj de la kursoj
Rilatoj kun ILEI

Komisiono pri Financoj:
Atenta sekvado de la financa stato de FEL
Serĉado de financaj fontoj
Decidoj pri investoj
Buĝeto

Komisiono pri Membraro:
Funkciado de la lokaj grupoj
Kontaktoj kun aliaj Esperanto-organizaĵoj en Flandrio
Rolo de "Horizontaal" kaj de "Vertikale"
Integrado de la membroj en la vivon de FEL

Komisiono pri Esperanto-domo:
Bezonoj en la domo por pli bona funkciado
Prijuĝado de proponitaj riparoj k.a.
Serĉado de pliaj eblecoj de enspezigado